


LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
1 ekz. f 0,03.
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
1 ekz. f 0,04.
(0,7 dol. 2,1 Sv. fr.)

VUNDITA.

(El: Histoire d'un Conscrit. De Erckmann-Chatrian.)

En la momento, kiam mi denove celis, falis la paŭlo el mia mano. Mi klinis min por preni ĝin, sed falis mem: kuglo trafis min en la maldekstran ŝultron. La sango fluis kiel varmeta akvo sur la brusto. Mi provis ekstari, sed pene mi nur povis sidi ĉe la stalmuro. La sango gutetis malsupren ĝis miaj femuroj, kaj mi pensis, ke mi mortos.

Miaj kamaradoj daŭrigis la pafadon super mia kapo, kaj la Prusoj ĉiam respondis.

Mi timis, ke dua kuglo mortige trafos min kaj mi trenis min per la dekstra mano post la angulon de la stalo. Sed mi falis en rivereton, kiu forkondukis la akvon de la strato. Mia maldekstra brako estis peza kiel plumbo kaj mi vidis ĉion turniĝi ĉirkaŭ mi. Ankoraŭ mi aŭdis la pafadon, sed kiel en sonĝo. Tio certe daŭris longe. Sed fine mi tute perdis la konscion kaj mi estis kiel mortinto inter la multaj mortintoj ĉirkaŭ mi.

Noktmeze mi rekonsciigis. Ĉio silentis. Sovaĝe ŝvebis la nuboj en la aero kaj la luno lumigis la vilaĝon, la renversitajn kanonojn kaj la amasojn da mortintoj.

Mi ne povis movi min kaj terure suferis. Nur en mia dekstra mano mi havis iom da forto, tiom, ke mi povis apogi min sur la kubuto. Mi vidis la mortintojn grandamase kuŝi ĝis la fino de la strateto. En la blanka lunlumo ĉiuj aspektis blanke kiel neĝo: kelkaj kun larĝe fermita buŝo, aliaj kun la vizaĝo surtere, tornistro sur la dorso, la mano spasme ĉirkaŭ la paŭlo. Estis kruela aspekto kaj miaj dentoj klakadis pro teruro.

Mi volis voki por helpo, kaj mi aŭdis nur malfortan krimon kiel de plorsingultanta infano. Senespera mi ree falis. Sed ŝajnis, ke la mallaŭta krio, kiun mi elpuŝis en la silento, ellogis aliajn kriojn de ĉiuj flankoj. Ĉiuj vunditoj kredis, ke venas helpo, kaj tiu, kiu ankoraŭ havis spiron, komencis plendi kaj dolorĝemi. Tio daŭris mallongan tempon, poste ĉiuj silentis, kaj mi aŭdis nur la spirblovadon de ĉevalo tuj apud mi, malantaŭ la heĝo. Ĝi provis ekstari, mi vidis ke ĝi levas la kapon kun la longa kolo, kaj poste ĝi ree falis.

Pro mia klopodo eksidi, la vundo denove malfermiĝis kaj mi sentis la sangon flui laŭ mia brako. Tiam mi fermis la okulojn por morti, kaj ĉiuj memoroj de mia infaneco revenis en mian spiriton kiel en sonĝo.

Mi pensis: Malfeliĉa patro, malfeliĉa patrino, se vi scius, ke via infano, kiun vi ĉirkaŭis per tiom da amo kaj zorgoj, ĉi tie mizere devas pereii en la koto, sola, senhelpa Kiel senesperaj vi estus kaj kiel vi malbenus tiujn, kiuj kulpas pri ĉi tio! Se vi estus ĉi tie! Se mi ankoraŭfoje povus peti pardonon pro ĉiuj zorgoj, kiujn mi kaŭzis al vi!

La larmoj fluis tiam sur mia vizaĝo kaj mi forte plorsingultis.

Tiam mi pensis pri la onklino Grédel kaj pri mia kara mastro Golden, kiu estis kiel patro por mi. Estis, kvazaŭ mi vidis ilian timegon, kiam ili aŭdis pri la granda batalo; la onklino Grédel, kiu ĉiutage iris renkonte al la leterportisto, kaj la sinjoro Golden, kiu estis sola en sia ĉambro kaj legis en la gazeto, ke la 3a divizio plej suferis Mia tuta animo estis ĉe ili

Mi imagis, ke iun tagon la poŝtisto al la onklino Grédel portas grandan paperon, la sciigon pri mia morto La onklino kun granda teruro legas ĝin. Mi aŭdis la plorsingultojn kaj la malbenojn de la onklino Grédel kontraŭ la milito. La bona patro Golden venis por konsoli ŝin, sed mem diris plorante en nepriskribebla malespero: „Ho Jozef, kompatinda Jozef!”

Tio ŝiris mian koron.

Kaj mi pripensis, kiel tridek aŭ kvardek mil familioj en Francujo, en Ruslando, en Germanujo ricevos la saman sciigon, kaj eĉ ankoraŭ pli kruelan sciigon, ĉar miloj da ili, kiuj kuŝis sur la batal-kampo, havas patron kaj patrinon, aŭ edzinon kaj infanojn. Estis, kvazaŭ malespera krio de la tuta homaro pro tiom da kruelaĵoj leviĝis al la ĉielo.

Ĉirkaŭ la mateno komencis plui. La unutona batado sur la

tegmentoj, en la ĝardeno kaj sur la strato sonis en la silento. La rivereto ŝvelis kaj la malvarma akvo tute malsekigis miajn vestojn. Estis kvazaŭ mi kuŝis en bano de glaciakvo.

De tempo al tempo oni aŭdis fali muron, aŭ tegmenton. La bestoj, timaj pro la batalo, ree kuraĝiĝis kaj montris sin en la tagiĝo. Kapri-no blekis en najbara stalo. Granda paŝtisthundo kun la vosto inter la kruroj serĉflaris la mortintojn. La ĉevalo, kiu certe kredis, ke ĝi estas lupo, komencis laŭte bleki, kaj la hundo forkuris.

Mi memoras ĉiujn ĉi detalojn, ĉar en la momento de la morto oni vidas kaj aŭdas ĉion. Estas kvazaŭ oni pensas: „Rigardu kaj aŭskultu bone baldaŭ vi vidos aŭ aŭdos nenion plu de tiu ĉi mondo”

Sed kion mi neniam forgesos, eĉ se mi fariĝos centjara, tio estas, ke mi en la malproksimo aŭdis kelkajn voĉojn. Ho, mi tute vekigis. Kiom mi aŭskultis kaj kiom mi faris malesperajn klopodojn por apogi min per mia brako kaj krii pro helpo. Estis ankoraŭ mallume, sed la ĉielo heliĝis ĉe la horizonto. En la malproksimo mi vidis tra la pluvo lumon, kiu iris tien kaj reen super la kampoj. Ĝi ŝajnis halti, jen ĉi tie, jen tie, kaj nigraj homfiguroj klinis sin antaŭen. Estis nur ombroj, sed aliaj ankaŭ vidis tiun lumon, ĉar de ĉiuj flankoj sonis ĝemoj tra la nokto, plendaj krioj, tiel mallaŭtaj voĉoj, ke oni kredis aŭdi infanojn, kiuj vokas sian patrinon!

En mia forta deziro, ke oni savu min, mi rigardis al tiu lumo, kiel dronanto al la sekura bordo. Mi faris malesperajn klopodojn por ekstarti kaj mia koro tremis pro espero. Mi volis krii, sed mia voĉo venis nur ĝis miaj lipoj. La bruado de la pluvo en la arboj kaj sur la tegmentoj superis ĉion. Kaj tamen mi altrudis al mi: „Ili aŭdas min, ili venas!”

Mi kredis vidi, ke la lanterno venas sur la vojo al la ĝardeno, kaj ke ĝi fariĝas pli klara. Sed post ioma ŝvebado super la batal-kampo, la lumo malaperis post altaĵon.

Tiam mi senkonscia denove falis malantaŭen.

En angulo de granda stalo mi rekonsciigis. Iu donis al mi akvon, kaj tio estis agrabla al mi. Malfermante la okulojn, mi vidis mal-junan soldaton kun grizaj lipharoj, kiu levis mian kapon kaj tenis la kalikon ĉe miaj lipoj.

„Nu,” li diris afable, „ĉu vi fartas iom pli bone?”

Mi ridetis al li pro ĝojo, ke mi ankoraŭ vivis. Miaj brusto kaj ŝultro estis firme envolvitaj; mi sentis tie brulantan doloron, sed tio ne gravis: mi vivis!

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Aperis artikoloj pri „La Juna Vivo” en: „La Pratiko”, „Svenska Arbetar Esperantisten”, „Sennaciulo”, „The British Esperantist”, „La Interniario, Svenska Esperanto Tidningen”, „Dansk Esperanto Blad”.

RESPONDE AL MULTAJ:

1. La dua numero de „La Juna Vivo” estis **duobla**. Devis esti 2—3.
2. Oni povas aboni nur ekde 1 Julio.
3. Se estos eble ni aperigos la gazeton dum la vintromonatoj regule dusemajne.
4. La 7a numero aperos 1 Okt.

LA JARABONO ESTAS:

Aŭstrujo	3.20 ŝil.	Germanujo	1.75 M.
Britujo	3 ŝil.	Hispanujo	5 pes.
Belgujo	15 fr.	Hungarujo	3.30 p.
Ĉeĥoslovakujo ..	16½ Ĉ. kr.	Latvujo	2. l.
Danujo	3 kr.	Norvegujo	2.7 kr.
Francujo	10 fr.	Polujo	3.6 zl.
Svislando	2. 10 fr.	Rumanujo	72 l.
U.S.A.	0.70 dol.	Svedujo	2.70 kr.
Bulgarujo	58 lev.		

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn
London, W.C.I.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen. Belga ĝironumero 335183.

Danujo: S.ino M. Jensen. Galtrup, Erslev.

Francujo: S.ro Mathieu. Dyon 27, Place de la République, Cote d'or.

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld.
Germana ĝironumero „Köln 104097”.

Hispanujo: S.ro Montserrat. Str. Provenza, 75, 2º, 3º. Barcelona.

Svedujo: John Karlsson. Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero
72295.

Oni povas pagi per poŝtmandato, ĝirokonto, respondkuponoj aŭ per papermono en letero.

KION LEO TOLSTOJ RAKONTAS AL INFANOJ

Pri leporoj.

Nokte la leporoj postlasas sur la neĝo profundan, klare videblan piedsignon.

Homoj kaj hundoj, vulpoj, kornikoj, kaj agloj tre ŝatas peli la malfeliĉajn leporojn. Se la leporo subite returnirus rekte laŭ la sama vojo, sen duoblaj saltoj, oni ne havus penon sekvi ĝian signon; sed feliĉe, la leporo estas timema, kaj tiu ĉi timo estas ĝia savo.

Nokte la leporo kuras sen timo tra kamparoj kaj arbaroj, kaj postlasas rektan, neinterrompitan signon, sed kiam matene ĝiaj malamikoj vekigās, tiam ĝi subite atentās ĉiujn sonojn; jen ĝi aŭskultas la bojadon de la hundoj, jen la krakadon de la glitveturiloj, jen la voĉojn de la kamparanoj aŭ la blekadon de la lupoj; kaj tial ĝi daŭre saltas de unu al alia flanko.

Ĝi saltas antaŭen, ektimas pri io, kaj duobligas sian signon. Tiam ĝi aŭdas ion alian, kaj per ĉiuj fortoj ĝi saltas aliflanken. Ĉe klara taglumo ĝi iras en sian kuŝejon.

Matene, kiam la ĉasistoj serĉas la signojn, ili eraras en la labirinto de duoblaj signoj kaj longaj saltoj kaj miras pri la ruzo de la leporo. Sed la leporo tute ne pensas pri ruzo: ĝi nur timas ĉion.

Bussum, Nederlando.

Trad. H. A. BUIS.

BESTO ANKAŬ BEZONAS AFABLECON.

Ĉimpanzo estis sur ŝipo, per kiu oni transportis ĝin al Ameriko. Dum ĉi tiu transporto oni instruis al la besto diversajn laborojn.

La simio hejtis la fornon kaj ĝi faris tion tiel bone kiel la maristoj mem. Ĝi atentis, ke la brulantaj karboj ne falu sur la plankon, kaj kiam la forno estis sufiĉe varma, ĝi avertis la bakiston per tre kompreneblaj signoj. Li plene fidis la beston kaj neniam bezonis prizorgi la fajron. La ĉimpanzo ankaŭ povis fari ĉiajn taskojn de maristo: ĝi levis la ankron, ĝi refiŝ la velojn kaj laboris tiel bone, ke ĉiuj maristoj rigardis ĝin kiel sian kunulon. Tial la ĉimpanzo estis tre feliĉa inter la ŝipanaro.

Venis tamen piloto sur la ŝipon, kiu estis tre kruela kontraŭ la besto. Li ĉiam turmentis ĝin, ne atentante la humilajn petojn de la besto, kiu interplektis la manojn por moligi la koron de la turmen-

tulo. Tamen la piloto daŭrigis siajn kruelaĵojn. La kompatinda besto toleris ĉiajn dolorojn, sed de ĉi tiu momento ĝi rifuzis ĉian nutraĵon kaj ĝi mortis kvin tagojn poste pro malsato kaj ĉagreno.

La tuta ŝipanaro estis kortuŝita, kvazaŭ maristo estis mortinta.

Amsterdam.

C. v. T.

LA MORTIGISTO.

Mi povus rakonti al vi pri homo, kiu dum la granda milito mortigis multajn homojn. Li ne komprenis kion li faris, ĝis la momento, en kiu li vidis morti unu el siaj viktimoj.

Mi tamen ne faros tion, ĉar eble vi jam konas ĝin.

Tial mi rakontos al vi alian rakonton. Estas tre simpla rakonto.

Ie en granda arbaro staris domo el trunkoj de arboj. En ĉi tiu domo el trunkoj de arboj loĝis ĉasisto. Oni nomis lin „la mortigisto”, tial, ĉar lia pafo neniam maltrafis; sed speciale pro tio, ke li mortigis ĉion, kio venis antaŭ la tubo de lia pafilo.

Ĝis Okazis en la vintro. Per grandaj flokoj la neĝo kovris la teron. La mortigisto sidis ĉe la fajro kaj fikse rigardis al la flamoj, ĉar li ne povis eliri por ĉasi.

Subite li eksaltis. Ĉu li aŭdis bone? Li malfermis la pordon Antaŭ li sur la neĝo kuŝis cervino kun sago profunde en la dorso. Petegante per mortantaj okuloj ĝi rigardis al la mortigisto.

Kaj ĉio ĉirkaŭ tiu ĉi malaperis en nigra mallumo.

Kiam li denove vidis, la mortigisto sin vidis sur granda ebenaĵo. Sur tiu granda ebenaĵo kuŝis miloj da mortantaj bestoj — estis la bestoj, kiujn li dum sia vivo mortigis. — Kaj ĉiuj rigardis lin kiel la cervino.

La vizio malaperis kaj la mortigisto denove vidis tion, kio estas ĉirkaŭ li.

Antaŭ liaj piedoj kuŝis la mortinta cervino.

Longan tempon la mortigisto rigardis al ĝi. Tiam li ree eniris sian domon el trunkoj de arboj, prenis sian pafilon kaj rompis ĝin en pecojn.

Mi jam diris al vi, ke mia rakonto estas tre simpla, — tre simpla —.

originale verkis P.

LA CIKONIO KAJ LA PAŬTISTO.

(Dana popolfabelo)

Estis belega somero. La spikoj staris alte sur la grenkampoj de la Molboanoj, kaj ondis kiel ora maro.

Sed iun tagon la loĝantoj eltrovis, ke cikonio, kiu antaŭ ne longe iris sur la herbejon kaj kaptis ranojn, nun impertinente venis sur la grenkampon.

„Estas terura afero”, diris maljuna Molboano, „per tiaj longaj kruroj, kiajn la cikonio havas, ĝi detruas nian grenon.”

Kion oni nun devis fari?

La Molboanoj multe babilis kaj ili interkonsentis: „La paŝtisto iru sur la kampon kaj forpelu la cikonion.” Nun oni vokis la paŝtiston. Sed la Molboanoj tuj vidis, ke li havas grandegajn kaj larĝajn piedojn. Estis klare, ke li per tiuj piedegoj detruos eĉ pli da spikoj ol la cikonio.

Jen ili staris.

Sed ili ja estis inteligentaj homoj! „Mi scias kion fari”, diris maljuna viro, kiu estis tre saĝa. „Ni portu la paŝtiston tra la kampon; tiel li ne povas fari domaĝon per siaj grandegaj piedoj.”

Ĉiuj tre ŝatis tiun konsilon, kaj ili tuj prenis la kampbarilon. Ili metis la paŝtiston sur la kampbarilon kaj kvar viroj nun portis lin tra la kampo, por ke li povu forpeli la cikonion. Laŭ tiu genia maniero la paŝtisto rompis eĉ ne unu spikon per siaj grandaj kaj larĝaj piedoj!

(La Molboanoj, kiuj loĝas en Jutlando, antaŭe estis konataj kiel tre malinteligentaj homoj.)

Odense—Denemarken

Trad. AAGE HUNDERUP-
PETERSEN.

LA TRI TAJLOROJ.

Tri tajloroj starigis butikojn en la sama strato. La unua skribis super la fenestro: „La plej bona tajloro en la urbo.” La dua skribis la devizon: „La plej bona tajloro en la mondo”. La tria, kiu estis pli sprita ol la aliaj, metis: „La plej bona tajloro en ĉi tiu strato.”

Londono, Anglujo.

E. L. OSMOND.

POR KOMENCANTOJ.

LA SAĜA STURNO.

Sturno volis trinki el akvobotelo, sed per la mallonga beketo ĝi ne povis atingi la akvon en la botelo. Ĝi pikis la vitron, sed ne povis rompi la botelon. Ĝi ankaŭ ne povis renversi la botelon, ĉar por tio ĝi estis tro malforta.

Ĝi serĉis multajn ŝtonetojn kaj ĵetis ilin en la botelon. La akvo leviĝis tiom alten, ke la saĝa sturno povis atingi ĝin per la beko kaj ne plu bezonis soifi.

(Tradukaĵo el la Germana.)

Schattendorf, Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

1. Kopiu la rakonton en vian kajeron.
 2. Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al la demandoj.
- | | |
|---------------------------------------|-------------------------------------|
| 1. Kie estis la akvo? | 8. Ĉu ĝi povis renversi la botelon? |
| 2. El kio la sturno volis trinki? | 9. Kion serĉis la sturno? |
| 3. Ĉu ĝi povis atingi la akvon? | 10. En kion ĝi ĵetis la ŝtonetojn? |
| 4. Kial ĝi ne povis atingi la akvon? | 11. Kial leviĝis la akvo? |
| 5. Per kio ĝi pikis la vitron? | 12. Per kio ĝi atingis la akvon? |
| 6. Ĉu ĝi povis rompi la botelon? | 13. Kial ĝi ne plu bezonis soifi? |
| 7. Kial ĝi ne povis rompi la botelon? | 14. Ĉu la sturno estis saĝa? |

SOLVOJ DE LA ENIGMOJ EL LA ANTAŬA NUMERO.

1. La sufikso „ej”
2. La sufikso „et”
3. La sufikso „er”
4. rano—ano.
5. haro—aro.

	0	0	0	0	
0	0			0	0
0		0		0	0
0			0	0	0
0	0	0	0		
	0	0	0		0

ENIGMOJ.

1.

Kun p mi estas frukto,
Kun v mi estas homo,
Kun l mi estas monero,
Kun ŝ mi estas truo.

Den Haag, Nederlando.

2.

Kun r mi estas ronda objekto,
Kun l mi estas metalo,
Kun g mi estas fiŝo.

F. WEEKE.

RUZULO.

Estis iom antaŭ vesperigo. Sinjoro sendis sian serviston, por aĉeti skatolon da alumetoj.

Karlo longe restis for. Jam estis mallume, kiam li revenis. Lia mastro riproĉis lin, ke li forrestis tiom longe! Ĉar li ja lasis lin sidi en mallumo!

La sinjoro nun flamigis alumeton, sed la alumeto ne ekflamis! Li prenis duan, sed ankaŭ tiu ĉi ne ekflamis! Li blasfemis kaj provis la trian: li ree ne sukcesis!

Nun li ekkriis: „Diabla viraĉo, kiajn alumetojn vi aĉetis? Ĉu vi ne vidas, ke ili ne taŭgas?!”

La „ruza” Karlo alrigardis sian mastron kun miro en la okuloj kaj poste diris, kun indigno en la voĉo: „Mi komprenas nenion de ĉi tio! Survoje mi provis ĉiujn alumetojn, kaj vere, ili ĉiuj estis bonaj kaj tuj ekflamis!”

Leeuwarden, Nederlando

Adapte trad. B. R.

LA PERDITA VALIZO.

Iun fojon mi devis porti grandan sumon da mono al iu malproksima urbo. Mi selis mian ĉevalon, ligis la valizon kun la mono al la selo kaj rajdis for. Mi kunprenis mian hundon.

En la mezo de granda arbaro la hundo subite ekbojis tre laŭte! Mi ordonis ĝin silenti, sed la besto ne obeis! Ĝi eĉ saltis supren kaj klopodis mordi la ĉevalon.

Mi nun supozis, ke la hundo iĝis rabia! Mi prenis mian pafilon kaj pafis; la besto falis teren kaj restis senmova.

Ĉar mi timis rabistojn, mi kiel eble plej rapide rajdis plue. Post iom da tempo mi rimarkis, ke mi perdis mian valizon! Imagu al vi mian konsterniĝon! Mi tuj rajdis returne kaj fine trovis ... mian jam mortan hundon, apud la valizo ... La fidela besto do ankoraŭ rampis de la loko, kie mi ĝin pafis, ĉi tien ...

Leeuwarden Nederlando

Adapte trad. B. R.



LA SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ.

1. Ha, jen estas vesthokaro!
2. Kiom alta tiu estas!
3. Ĝi pendu!
4. Ho ve, tion mi ne celis!

Bonvolu rakonti la enhavon de ĉi tiuj kvar bildoj.

La bonajn verkaĵojn ni metos en la gazeton.

Dum kvar monatoj ni sendos kvarsemajne al la geamikoj, kiuj

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.

liveris la plej bonan rakonton, du librojn.

Metu sub vian leteron: nomon, adreson kaj aĝon.

Sendu vian rakonton al:

CORNELIA VAN TUSSENBROEK
Minervalaan 39 hs. Amsterdam Nederland.

MALOBEAJ KNABOJ.

1

Tri knaboj promeni deziras
Kaj onklo al ili do diras:
„Nur remu, knaboj, kun atento,
Ĉar eblas malbon-akcidento.”

2

La knaboj lin eĉ ne aŭskultis
Kaj jen kio baldaŭ rezultis:
Pro luda petola ekbato
Renversis sin tuj la boato.

3

La knaboj dronante stertoris
Feliĉe la onklo deĵoris:
Ne lasis la knabojn elvide
Kaj savis nun ilin rapide.

Ruslando

Nik, Nek.

Nik Nek en Ruslando — Vi ensendis spritan poemon, tre bone verkitan. Kiomjara vi estas? Ĉu vi havas infanaĝon?


Memorludeto.

Oni metu sur la tablon 20 diversajn objektojn. Tiam oni alvoku la kunludantojn, kiuj dum minuto povas rigardi la objektojn.

Poste oni kovras la objektojn per tuko, kaj ĉiu el la kunludantoj skribu sur paperon la nomojn de ĉiuj objektoj, kiujn li memoras.

Tiu, kiu memoras la plej multajn nomojn, povas meti novajn objektojn sur la tablon.

Estas agrabla ludeto, kiu fortigas la memoron.



LA KVARA LECIONO.

- | | | |
|----------------|-----------------|---------------|
| 1. budo. | 13. arlekeno. | 25. galantoj. |
| 2. flago. | 14. flugmaŝino. | 26. kakti. |
| 3. stelo. | 15. tamburo. | 27. ĉapelo. |
| 4. pupo. | 16. trumpeto. | 28. bluzo. |
| 5. fosilo. | 17. urso. | 29. jupo. |
| 6. violono. | 18. vinberoj. | 30. ŝtrumpoj. |
| 7. lokomotivo. | 19. paperoj. | 31. ŝuoj. |
| 8. vagono. | 20. saketoj. | 32. robo. |
| 9. ĉevalo. | 21. korbo. | 33. prunoj. |
| 10. pilko. | 22. terpomoj. | 34. placo. |
| 11. sitelo. | 23. salato. | 35. hoko. |
| 12. blokoj. | 24. karotoj. | |

Bona banano — bonaj bananoj.

Granda piro — grandaj piroj.

Bela floro — belaj floroj.

Sur la placo.

A.

1. **Tri** budoj staras sur la placo.
2. En la budoj estas **varoj**.
3. Sur la **unua** budo **flirtas** flago kun **verda** stelo.
4. En la unua budo estas **belaj** varoj.
5. Tie estas lokomotivo kun vagono kaj ankaŭ **granda** pilko kaj **malgranda** pilko.
6. Violono, trumpeto kaj tamburo estas **muzikinstrumentoj**.
7. En la dua budo estas **multaj** fruktoj.
8. Tie estas **ruĝaj** pomoj, **flavaj** piroj kaj **bluaj** prunoj.
9. Ankaŭ tie pendas flavaj bananoj kaj bluaj vinberoj.
10. La salato estas **verda** kaj la karotoj estas **ruĝaj**.
11. **Sub** la budo staras korbo kun terpomoj kaj kesto.
12. Sur hoko pendas **blankaj** paperoj kaj **brunaj** saketoj.
13. En la **tria** budo estas floroj.
14. Tie estas blankaj galantoj kaj verdaj kakti.
15. La floroj estas belaj kaj **freŝaj**.
16. Antaŭ la budoj staras la fraŭlino kun la knabino.
17. Sur la fraŭlino estas **modernaj vestoj**: Bela ĉapelo, blanka bluzo, **longa** jupo, **silka** ŝtrumpoj kaj **elegantaj** ŝuoj.

18. Sur la knabino estas blanka robo kaj **nigraj haroj**.
 a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
 b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.

B.

- Kia estas la piro? La piro estas flava.
 Kia estas la pilko? La pilko estas granda.
 Kiaj estas la pomoj? La pomoj estas ruĝaj.
 Kiaj estas la floroj? La floroj estas belaj.
 Kia estas la pruno? La pruno estas blua.
 Kie estas la pruno? La pruno estas en la budo.
 Kio estas la pruno? La pruno estas frukto.
 Kia estas tamburo? La tamburo estas granda.
 Kie estas la tamburo? La tamburo estas en la budo.
 Kio estas la tamburo? La tamburo estas muzikinstrumento.
 a. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
 b. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.

C.

Respondu al la demandoj:

- | | |
|-------------------------------|--------------------------------|
| 1. Kio staras sur la placo? | 8. Kio estas en la tria budo? |
| 2. Kio estas en la unua budo? | 9. Kie staras la fraŭlino? |
| 3. Kie estas la flago? | 10. Kio estas sub la dua budo? |
| 4. Kio estas en la dua budo? | 11. Kie estas la floroj? |
| 5. Kio pendas en la dua budo? | 12. Kiaj estas la floroj? |
| 6. Kio estas la violono? | 13. Kie estas la fruktoj? |
| 7. Kie estas la pupoj? | 14. Kiaj estas la fruktoj? |

Tiu ĉi leciono sufiĉas por du semajnoj.

 EL NIA LETERUJO.

- Z. Alsunga, Letlando — Sendu baldaŭ al ni kopion, tiam ni verŝajne pli bone komprenos vin.
 B. L Sask, Kanadujo — La kanton ni enpresigos en unu el la sekvontaj gazetoj. Ni ne ŝatas antikvajn rakontojn. Bonvolu sendi ion de modernaj verkistoj.
 O. R., Turĉiansky, Ĉeĥoslovakujo — Lingvo kaj stilo estas bonaj, sed la enhavo estas tro simpla. Provu traduki rakonton por pli aĝaj infanoj.

- F. O., Hluk, Ĉeĥoslovakujo — Mi preferas rakontojn de modernaj, konataj verkistoj.
- Y Is, Tokio, Japanujo — Pri la pago vidu la rubrikon: „Komunikoj pri la gazeto”.
- M. C., Budapeŝt, Hungarujo — Poste ni decidus pri la pagmaniero en H.
- P., Iŝlaŭzas, Litovujo — En la sekvontan numeron ni enpresigos unu el viaj fabeloj. La aliaj ne plaĉas al ni. Bonvolu sendi modernajn verkaĵojn.
- K. P., Göteborg, Svedujo — Komprenoble vi povas vendi la gazetojn ponumere.
- J. K., Hylinge, Norrköping Svedujo — La prezo estas: 20 duoblaj ekz: 3 sv. kr. — 20 unuoblaj ekz: 1½ sv. kr. Trikvaronjara abono: 2.10 kr; duonjara: 1,40 kr; kvaronjara: 0.70 kr.

SERĈANTE LA PRIMOLON.

(POPOLA ARIO EN POITOU)

Pro-men-an-te tra l'kam-pa-ro, Ne zorg-an-teprila hor', Vag--is
mi en fru-a ja-ro, Kaŝ-is sin printempa flor', Ven-to flustris tralarb-
ar-on, Zum-is ĝi---an glor'!

2.

Promenante tra l' kamparo
Kun atento en mien'.
Ne primolon de l' arbaro
Trovis mi en streĉa pen',
Regis ja sen ia baro
Nur la verda gren'.

Buxières-D'Aillac, Francujo.

trad. J. BARONNET.

KORESPOND-ADRESOJ: ĉiu vorto: 0.03 gld.

REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
1/16 paĝo: 2 gld.

BULGARUJO

la lando de la rozoj, la Balkana
Svisujo, ekkonu ĝin per la esp.
verkoj:

La Bulgara lando kaj popolo,
kun etnografia trikolora
landkarto, 50 pĝ, rabatita
prezo 1,50 fl.

Bulgara Antologio,
bukedo de 40 geverkistoj, prozo
kaj poezio, kun fotoj, 250 pĝ,
rabatita prezo 1,50 fl.

Haveblaj ĉe l'aŭtoro:
Ivan Krestanov, str. 6 Septembri
No. 2, Sofia, Bulgarujo.



„FLORETOJ”

Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj
de C. Jetses
prezo 0.70 ned. guld.

**Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:**

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag
Batavia.

Biblioteko “Nova Kulturo”

1. Unua serio: **La alta idealo**, de P. Danov en 10 numeroj po 25 paĝoj — sv. fr. 3.
2. Dua serio: **Jen la Homo**, de P. Danov en 10 numeroj, tute 300 paĝoj — sv. fr. 4.
3. **La Nova Evo**, de P. Danov, 40 paĝoj — sv. fr. 1,50.

FRATECO, MONATA GAZETO.

Heroldo de la nova tempo kaj de la novaj komprenoj,
montrante al la homoj tute novajn metodojn por la solvo de
la malfacilaj mondproblemoj. Kondukas la homojn al la fonto
de la vivo kaj al la profundaj, sekretaj scioj, kiuj malkovras
al la homo novajn horizontojn, novan kampon por laboro —
la vera, la esenca laboro de ĉiu racia homo.

Petu specimenon!

Abonkotizo: I sv. fr. aŭ 4 int. respkuponoj.

Al tiu, kiu mendos la librojn kaj la gazeton ni faros 50 %
da rabato.

ADRESO: ATANAS NIKOLOF, SEVLIEVO, BULGARUJO.